

**INFORMILO DE KKE — KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ**

Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. — Av. Treze de Maio, 47, sobreloja 208 — Centro  
Rio de Janeiro - RJ — CEP.: 20031-921 (21) 2544-4314 Fax: (21) 2220-7486  
retpoŝta adreso: esperanto.kke@gmail.com; ttt-paĝo: www.kke.org.br

**Nº 53****8ª JARO (NOVA FAZO)****NOVEMBRO-DECEMBRO/2009**

## KAMPANJO “ESPERANTO EN LA BIBLIOTEKOJN” Cent libro-pakaĵoj senditaj



**La respondeculoj pri la kampanjo: Aloísio Sartorato kaj Maria das Graças Carâp**

## Eventos

**Set, 2** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Set, 4** – Palestra de Fabiano Henrique sobre o tema “Ismael Gomes Braga: uma Vida Dedicada ao Esperanto”, com a presença de 11 pessoas.

**Set, 9** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Set, 11** – Exibição do filme “Esperanto estas ...”, com a presença de 10 pessoas.

**Set, 14** – Roda Literária / Poesia em esperanto, coordenada por Aloísio Sartorato.

**Set, 16** – Clube de conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Set, 18** – Palestra de Álvaro Motta sobre o tema “Miaj Kongresaj Impresoj pri la 94-a UK kaj IJK”, com a presença de 18 pessoas.

**Set, 19** – Projeto “Conheça o Rio a pé”, com visita à Cinelândia e Passeio Público, ciceroneada em esperanto por Laura Pereira de Alcântara e participação de 10 pessoas.

**Set, 21** – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto, coordenada por Aloísio Sartorato.

**Set, 23** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Set, 25** – Festa dos Aniversariantes, com a participação especial de Vítor Mendes (violão e voz) e a presença de 15 pessoas.

**Set, 28** - Roda Literária / O estilo de Zamenhof, coordenada por Aloísio Sartorato.

**Set, 30** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles

**Out, 2** – Palestra de Jeremias Santos sobre o tema “Introdução ao Estudo da Cor”, com a presença de 10 pessoas.

**Out, 3** – Ago-Tago no Largo da Carioca, com a presença de 5 ativistas.

**Out, 5** – Roda Literária / Prosa em esperanto, coordenada por Aloísio Sartorato

**Out, 7** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Out, 9** – Palestra de Graça Thuler e Rosana Caraméz sobre o tema “Duas brasileiras em Bialystock”, com a presença de 10 pessoas.

**Out, 14** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Out, 16** – Palestra de Célio Freitas Martins sobre o tema “Ĝeneralaj Traĵoj de la Lingvo Pola”, com a presença de 17 pessoas.

**Out, 19** – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto, coordenada por Aloísio Sartorato.

**Out, 21** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Out, 23** – Palestra de Alfredo Aragón sobre o tema “Mia Amiko Sylla Chaves”, com a presença de 15 pessoas.

**Out – 26** – Roda Literária / O estilo de Zamenhof, coordenada por Aloísio Sartorato.

**Out, 28** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Out, 30** - Festa dos Aniversariantes com a participação especial de Dirce Sales (cantora) e Nilson da Costa (dançarino), com a presença de 23 pessoas.

## Doações para a Caixa Geral

Givanildo Ramos Costa: R\$ 20,00; Almir Ferreira: R\$ 1.565,06; Willy do Nascimento Sales: R\$ 100,00; Carlos Gaia: R\$ 20,00; Almir Ferreira: R\$ 500,00; Givanildo Ramos Costa: R\$ 50,00. *Al ĉiuj koran dankon!*

## Campanha “Esperanto nas Bibliotecas”

Raymundo de Souza: R\$ 10,00; Elma do Nascimento: R\$ 10,00; Almir Ferreira: R\$ 500,00 *Ni kore dankas vin!*

## Expediente

**InKo**, boletim informativo da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; edição nº 53, novembro / dezembro 2009.

**Coordenação:** Givanildo R. Costa, Presidente da KKE.

**Redação e diagramação:** Aloísio Sartorato

**Revisão:** Célio F. Martins

**PLIAN FOJON “NI ATINGAS LA CELON EN GLORO”  
KIEL ANONCIS ZAMENHOF**

Plian fojon ni atingas la finon de la jaro. Se ni bone taksas ĝin, oni rimarkas, ke la jaro estis fruktodona, spite de la malfacilaĵoj, kiujn ni alfrontas. Cetere sen tiaj “specialaĵoj”, mi kredas, ke ni ne bone survojus esperantlingve.

Kiam mi certigas vin, ke la Internacia Lingvo fruktodonas, ne estas nur pro mia pozitiva sinteno, kiun mi normale vivigas, sed ĉefe pro miaj esperantaj ĉiutagaj travivaĵoj en KKE; en la esperantista kunordigado en Radio Rio de Janeiro per pluraj aktivecoj, inter ili la radiprogramo “Esperanto, la Lingvo de Frateco”, prezentata ĉiumarde je la 15-a; kaj ĝenerale en la E-Movado mem, kiu havas diversajn sekvojn.

Kiom da novaj eroj aperis ĉi-jare, en nia lando, ekzemple, kiuj rilatis al la Internacia Lingvo! Inter ili, la plej ĉefa, kiu estas la projekto proponita de la Senatano Christovam Buarque, celante la instruadon de Esperanto al lernantoj en publikaj mezlernejoj laŭ manifestota opcio de la gelernantoj. Sen mencii la pligrandiĝan kvanton da personoj, kiuj interesiĝas kaj lernas la lingvon, aŭtodidakte aŭ en varispecaj kursoj, pagitaj aŭ ne, krom la instruadon de la lingvo al infanoj, faritan tie-ĉi en Rio de Janeiro kaj aliloke.

Kun certeco kelkaj esperantistoj ne kredas tion, kion mi diras. Laŭ ili, se la lingvo kreita por fariĝi la dua al ĉiuj popoloj kaj monda, post 122 jaroj da ekzistado ankoraŭ ne havas 1 milionon da parolantoj en la tuta mondo, kiel mi venas aserti, ke en Brazilo pligrandiĝas la nombro da Esperanto-parolantoj. Por tiuj, mia aserto estas troiga.

Ne gravas.

Gravas la alveno de la fino de plia jaro, certigante la sukceson de Esperanto, kiu ne plu devas esti nomata la idiomo de la estonto, sed la Lingvo de la Estanteco. Cetere, nomigante ĝin tiamaniere, oni ne nur omaĝas Zamenhofo-n kaj festas lian 150-an naskiĝan datrevenon, sed sammaniere oni omaĝas ankaŭ tiujn, kiuj multe laboris kaj laboras, celante la efektivigon de la lingvo en Brazilo kaj multaj aliaj landoj.

Fine, mi volas manifesti specialan dankegon al la ĉi-jaraj forpasintaj esperantaj laboristoj. Délio Pereira de Souza, Sylla Chaves, Sebastião Formiga, Lorraine kaj Zilda Ferreira, pro la multo kiun ili faris cele al la pligrandiĝo de nia KKE kaj Esperanto.

Dio kaj Jesuo benu ilin, kie ajn ili sin trovas, pro ilia senlaca kaj idealisma laboro por Esperanto.

Feliĉan Kristnaskon kaj Prosperan 2010 al ĉiuj!

**Givanildo Ramos Costa**

**“KAMPANJO “ESPERANTO EN LA BIBLIOTEKOJN”:  
CENT LIBRO-PAKAĴOJ SENDITAJ!**



Iam, Monteiro Lobato, fama brazila verkisto, asertis: “Landon oni konstruas per homoj kaj libroj”. Imitante Monteiro Lobato, ni ankaŭ povas diri ke: “Movadon oni konstruas per homoj kaj libroj”.

Konscia pri la ankoraŭa graveco de la libro en la nuntempa mondo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE), el Rio de Janeiro, Brazilo, decidis lanĉi, okaze de sia kvindekjariĝo, en julio 2001, la kampanjon “Esperanto en la Bibliotekojn”, kies ĉefa celo estas provizi, precipe publikajn bibliotekojn, per libroj en aŭ pri Esperanto.

Tiucele jam estis ekspeditaj al 88 enlandaj kaj al 12 alilandaj bibliotekoj (en Paragvajo, Mozambiko, Rusio, Dominika Respubliko, Irano, Alĝerio, Portugalio, Togo, Kubo, Kanado, Argentino kaj Ĉeĥio) pli ol 1.000 librojn (ĉefe lernolibrojn kaj vortarojn, sed ankaŭ literaturaĵojn!). Tiel plurdekoj da urbaj bibliotekoj en diversaj ŝtatoj ricevis la donacon de la kampanjo. Krome oni sendis specialajn pakajojn, entenantajn verkojn de la brazila literaturo tradukitajn en Esperanton al “Biblioteca Nacional” kaj al “Biblioteca da Academia Brasileira de Letras”.

Per enlandaj donacoj ni disvastigas E-on inter neesperantistoj brazilaj. Per alilandaj donacoj ni helpas lokajn movadojn ankoraŭ ne tre fortajn.

La kampanjo estas komplete subtenata de libervolaj mondonacoj de deko da brazilaj samideanoj. KKE zorgas pri la ekspedo kaj administra laboro de la kampanjo.

**Aloísio Sartorato    Maria das Graças Carâp  
respondeculoj**

# MENSA SANO

Rubem Alves

Mi estis invitata fari prelegon pri mensa sano. Kiuj invitis min, tiuj supozis, ke mi, kiel psikanalizisto, fakas pri tiu afero. Ankaŭ mi same pensis tiel, kiam mi akceptis la inviton.

Sed, apenaŭ mi enpensiĝis serioze pri la afero, mi pentis. Mi konkludis, ke mi scias nenion. Mi klarigu. Mi komencis mian pripenson farante liston da homoj, kiuj, laŭ mia vidpunkto, havis riĉan kaj viglan mensan vivon... homoj, kies libroj kaj verkoj estas nutraĵo al mia animo: Nietzsche, Fernando Pessoa, Van Gogh, Wittgenstein, Cecília Meireles, Maiakovski. Sed, mi tuj maltrankviliĝis. Nietzsche freneziĝis. Fernando Pessoa estis drinkema. Van Gogh sin mortigis. Wittgenstein ĝojigis sin tiam, kiam li eksciis, ke li mortos baldaŭ: li ne plu sukcesis vivi kun tiom da angoro. Cecília Meireles suferadis mildan kronikan deprimon. Maiakovski suicidis.

Tiuj klarmensaj kaj profundaj homoj daŭre estos pano al la vivantoj, dum longa tempo, post kiam ili estos tute forgesitaj. Sed, ĉu ili havis mensan sanon? Mensa sano – tiu stato pere de kiu la ideoj kondukas bone, ĉiam samaj, antaŭkalkuleblaj, sen surprizoj, obeemaj al la ordonoj de la devo, kun ĉiuj aferoj en siaj ĝustaj lokoj, kiel vicordigitaj soldatoj, neniam permesante, ke la korpo manku al la laboro, nek ke ĝi faru ion neatenditan.

Eĉ ne necesas ĉirkaŭi la mondon per velŝipo. Sufiĉas fari tion, kion faris Shirley Valentine (se vi ankoraŭ ne vidis, vidu la filmon), aŭ sperti malpermesitan amon, aŭ, pli danĝere ol ĉio, havi la kuraĝon pensi tion, kio neniam estis pensata.

Penso estas afero tre danĝera... Ne, mensan sanon ili ne havis... Ili estis tre klarmensaj kontraŭ tio. Ili konsciis, ke la mondo estas regata de frenezuloj kaj maljunuloj kun kravatoj. Kiel mastroj de la povo, la frenezuloj fariĝas la prototipoj por la mensa sano.

Kompreneble, neniu el tiuj nomoj, kiujn mi menciis, postvivus psikologian teston, al kio li devus submetiĝi, se li petus dungon en entrepreno. Aliflanke, mi neniam aŭdis pri politikistoj havantaj deprimon. Ili marŝas ĉiam fortaj en piedirejoj tra la urbostratoj, disdonantaj ridetojn kaj certecojn.

Mi sentas, ke miaj pensoj povas sami al pensoj de frenezulo, kaj tial mi tuje faru la necesajn klarigojn. Ni estas tre similaj al komputiloj. La funkciado de la komputiloj, kiel sciante, postulas la interagon de du partoj. Unu el ili nomiĝas aparataro aŭ, laŭlitere<sup>[1]</sup>, “malmola ekipaĵo”, kaj la alia nomiĝas programaro aŭ “mola ekipaĵo”. La aparataro konsistas el ĉiuj solidaj aferoj, el kiuj la komputilo estas farita. La programaro estas konsistigita el “spiritaĵ” entoj – simboloj, kiuj formas la programojn kaj kiuj estas konservitaj en diskoj. Ankaŭ ni havas unu aparataron kaj unu programaron.

La aparataro estas la cerbaj nervoj, la neŭronoj, ĉio tio, kio konsistigas la nervan sistemon. La programaro konsistas el serio da programoj, kiuj restas konservitaj en la memoro. Tiel same kiel en la komputiloj, tio, kio restas en la memoro, estas la simboloj, malpezegaj entoj, eĉ nomeblaj "spiritaj". La plej grava programo estas la lingvo.

Komputilo povas freneziĝi pro difektiĝoj en la aparataro, aŭ pro difektiĝoj en la programaro. Ankaŭ ni. Kiam nia aparataro freneziĝas, oni devas venigi psikiatrojn kaj nervologojn, kiuj venos al ni kun siaj hemiaj porcioj kaj bisturioj por ripari tion, kio pereis. Tamen, kiam la pereco okazas en la programaro, porcioj kaj bisturioj ne efikas.

Oni ne riparas programon per ŝraŭbturnilo, ĉar la programaro estas farita el simboloj, kaj nur simboloj povas eniri en ĝin. Ni aŭdas kanzonon, kaj sekve ni ploras. Ni legas erotikajn poemojn de Drummond, kaj la korpo ekscitiĝas. Prezentu al vi sonaparaton. Imagu, ke la gramofono kaj ties akcesoraĵoj (la aparataro) kapablas aŭdi la muzikaĵon, kaj sekve emociiĝi. Imagu pli, ke la beleco estas tiel granda, ke la aparataro ne entenas ĝin, kaj sin difektas pro la emocio!

Nu, estis ĝuste tio, kio okazis al tiuj homoj, kiujn mi menciis en la komenco: la muziko, kiu aŭdiĝis el ilia programaro estis tiel bela, ke ilia aparataro ne eltenis...

Post tiuj konjektaĵoj, ni povas preskribi recepton, kiu certigos al tiuj, kiuj severege sekvos ĝin, "mensan sanon", ĝis la finiĝo de iliaj vivoj.

Prefere elektu modestan programaron. Evitu la belajn kaj kortuŝajn aferojn.

La belo estas danĝera al la aparataro. Singardu kontraŭ la muziko... Brahms, Mahler, Wagner, Bach estas speciale kontraŭindikataj. Pri la legaĵoj, evitu tiujn, kiuj estas pensigaj. Sed, restu trankvila. Estas vasta literaturo specialigita por malebligi la pensadon. Se estas libroj de D-ro Lair Ribeiro, kial riski legi Saramagon?

La ĵurnaloj favoras al tiu sama celo. Ili devas esti legataj ĉiutage. Ĉar ili publikigas ĉiam la samajn aferojn, kun malsamaj nomoj kaj vizaĝoj, estas certigate, ke nia programaro pensos ĉiam samajn aferojn. Kaj, en la dimanĉoj, ne forgesu Sílvio Santos kaj Gugu Liberato[2].

Sekvante tiun recepton, vi ĝuos vivon trankvilan, kvankam banalan. Sed, ĉar vi kulturis la sensentemecon, vi ne perceptos, kiel banala ĝi estas. Kaj, anstataŭ sperti la saman destinton de tiuj homoj, kiujn mi komence citis, vi emeritiĝos por realigi viajn sonĝojn. Bedaŭrinde, tamen, kiam alvenos tiu momento, vi jam estos forgesinta, kiaj ili estis...

[1] La laŭlitereco originas el la angla fakvorto "hardware", kiu komence direblis *hardvaro* en Esperanto, kompare kun "software", kiu antaŭe E-nomiĝis *softvaro*.. – La tradukinto.

[2] Prezentistoj de popularaj brazilaj televidprogramoj, samtrajtaj al "Domingão do Faustão" kaj "Raul Gil". – Noto de la tradukinto.

*Elportugalis: Josenilton*

# VIVOFLUO

**Benedicto Silva**



**Rivereto murmuranta  
en la koro de l' arbaro  
fluas kante kaj senhalte,  
malgraŭ ĉia, ĉia baro ...**

**Tia estas mia vivo  
en la sino de l' homaro;  
ĝoje finas ĝi senĉese,  
malgraŭ ĉia viv-amaro...**

*(El la Brazila Esperanta Parnaso)*

## KIEL DIRI?...



Paulo Sérgio Viana

Tradukado estas trejnado por malfiero: ofte ne eblas trovi tute kontentigajn transmetojn de unu lingvo al alia, kaj tradukanto devas ĉiam prepariĝi por kritikoj. Tamen, ĝi estas grava, necesa kaj alfrontenda tasko, ĉar verŝajne la mondo neniam havos unu solan lingvon. Koncerne Esperanton, des pli grave, ĉar interalie nia lingvo celas servi kiel ponto inter kulturoj.

La ĉiama dilemo staras inter *fideleco* kaj *natureco*: tradukon oni devas legi kvazaŭ originalaĵon, sed sen perfido. Kiel atingi tion? Nur per iom-post-ioma obstina alproprigo de la spirito de ambaŭ lingvoj, flanke de la tradukanto. Por tio ne ekzistas ebla miraklo – nur konstanta, atenta kaj amplena aktiva uzado de tiuj lingvoj. Alivorte: ĉiutage legi, paroli kaj aŭskulti ties vortojn, frazojn, parolturnojn kaj proprajn dirmanierojn.

Kiam oni konsideras la malfacilan arton traduki, plej ofte oni tuj pensas pri *literatura, beletra* tradukarto. Oni pensas pri la altvaloraj prozaĵoj kaj versaĵoj de la tutmonda literaturo. Prave. Ĉi tiuj estas la pinto de la defio: Esperantigi paĝojn de Victor Hugo, Ŝekspiro, kaj Tolstoj ja alportas respondecon proporcian al la graveco de tiaj geniuloj. Ĝi estas tasko por malmultaj talentuloj – se eble same geniaj. Tamen, ekzistas alia dimensio de la arto traduki, kiu restas iom flankenlasata, kaj koncernas la vastan Esperantistan popolon, kiu ne pretendas geniecon aŭ apartan lingvan talenton. La ordinara, ĉiutaga uzanto de nia lingvo, sen konsidero pri altaj artaj intencoj, ofte stumblas ĉe ĉiutagaj esprimoj, vortoj kaj frazoj, foje tute nemalhaveblaj, se oni ja konsideras Esperanton kiel vivantan, pulsantan lingvon! Mi celas la foje komikajn, foje kuriozajn, foje praktikajn parolturnojn, kiuj karakterizas la ĉiutagan uzadon de ĉiu lingvo. Post la elementa kurso de Esperanto, estas tempo eklerni tiajn esprimojn. Ili estas senfina amaso! Ni devus helpi niajn komencantojn (ankaŭ la eternajn...) trovi solvojn por tiaj sukaj dirmanieroj por transmeti ilin el la gepatra lingvo al Esperanto.

Ĉi tiu modesta prezento estas nura provo stimuli al tia – se tiel diri – *populara*



*tradukado*. Evidente, la kvanto da tiaj esprimoj estas senfina, se oni konsideras, ke pitoreskaj diraĵoj kreiĝadas konstante en vivantaj lingvoj. Ĉi tie ni listigos nur kelkajn, kunigitajn sen speciala kriterio. Mi proponas portugallingvajn vortojn, parolturnojn kaj frazojn. Fine de la teksto vi trovos ilin tajpitaj per etaj litertipoj (por ke vi sentu vin motivataj trovi viajn proprajn tradukojn, kaj nur poste kompari kun miaj – eble vi atingos pli bonajn rezultojn!).

\*\*\*

Ni komencu per kelkaj laŭliteraj tradukoj, kiujn indas alĝustigi, inter portugallingvanoj. La ĝustan formon mi metas inter parentezoj:

- *Participar do congresso*: partopreni de la kongreso (partopreni en la kongreso, aŭ la kongreson).

- *Estou preocupado com você*: mi estas priokupita pri vi (mi estas maltrakvila, aŭ zorgoplena pri vi).

- *Ele vestiu uma camisa verde*: li vestis verdan ĉemizon (li surmetis verdan ĉemizon, aŭ sin vestis per verda ĉemizo).

- *Estou curioso para assistir o filme*: mi estas kurioza spekti la filmon (mi estas scivolema spekti la filmon).

- *Ela estava extremamente elegante*: ŝi estis tro eleganta (ŝi estis treege eleganta).

- *Pedro ofereceu à mãe um belo presente*: Petro oferis al sia patrino belan donacon (Petro donis, aŭ proponis, al sia patrino belan donacon).

- *Aquele deve ser o carro de João*: tiu devas esti la aŭtomobilo de Johano (tiu certe estas la aŭtomobilo de Johano, aŭ tiu eble estas la aŭtomobilo de Johano).

- *É tarde, não vou mais à aula*: estas malfrue, mi ne iros pli al la leciono (mi ne plu iros al la leciono, aŭ mi jam ne iros al la leciono).

- *Entre Paulo e Marta, ela é a mais esperta*: inter Paŭlo kaj Marta, ŝi estas la plej lerta (inter Paŭlo kaj Marta, ŝi estas la pli lerta).

- *Fracassei na prova*: mi frakasis je la ekzameno (mi fiaskis je la ekzameno).

- *Diante da ameaça, ele foi correndo estudar a lição*: post la minaco, li kuris por studi la lecionon (post la minaco, li rapidis studi la lecionon).

- *O novo curso vai começar em janeiro*: la nova kurso komencos en januaro (la nova kurso komenciĝos en januaro).

- *Por causa do mau tempo, pensei que ele não chegaria*: pro la malbona tempo, mi pensis, ke li ne alvenus (pro la malbona vetero, mi pensis, ke li ne alvenos).

**RIMARKO:** plej multaj Esperantistoj en la tuta mondo nuntempe preferas la formojn “peti al...” kaj “demandi al...”, malgraŭ la uzado de Zamenhof: “peti –n...”, aŭ “peti de...” kaj “demandi –n...”, aŭ “demandi de...”. Eble estus tro severe konsideri la unuajn formojn kiel erarajn, sed sendube la Zamenhofaj estas pli klaraj kaj logikaj.

\*\*\*

Nun mi proponos al vi ĉiutagaĵojn en la portugala lingvo. Klopodu mem trovi bonajn solvojn:

### 1. *Bode expiatório*

2. *Lua-de-mel*
3. *É a pura verdade!*
4. *Não estou nem aí!*
5. *Conversa fiada*
6. *Gorjeta*
7. *Quando começou a aula, ele “se mandou”.*
8. *Disputar uma vaga*
9. *Um pouco de chuva não fará mal.*
10. *Morrer de inveja*
11. *Estou abusando da sua bondade.*
12. *Engarrafamento de trânsito*
13. *Relógio à prova d'água*
14. *À prova de fogo*
15. *Bom senso*
16. *Crachá*
17. *Oso duro de roer*
18. *Com a boca na botija*
19. *Pagar o pato*
20. *Ficar sem graça*

\*\*\*

Sekve, mi proponas al vi proverbojn, kiuj kolorigas nian babiladon, kaj havas precizajn tradukojn en Esperanto. Provu, antaŭ ol legi la jam akceptitajn tradukojn:

21. *De noite todos os gatos são pardos.*
22. *Se os olhos não veem, o coração não sente.*
23. *Saco vazio não pára em pé.*

Laste, por kontentigi tiujn, kiuj amas beletron, jen defio alfrontita de du el niaj plej talentaj tradukistoj:

24. *Meu pai explodiu de rir, minha mãe rebentou de raiva e de aflição, e todos estavam embasbacados.* (“*Esperanto sem Mestre*”, tradukekzerco de Porto Carreiro Neto.)
25. *Dona Dionora, que tinha belos cabelos e olhos sérios, escutou aquela resposta, e não deu ar de seus pensamentos ao pobre camarada Quim.* (“*A Hora e Vez de Augusto Matraga*”, de Guimarães Rosa, traduko de Leopoldo Knoedt.)

1. Propeka kapro. 2. Mielluno. 3. Ĝi estas la pura vero. 4. Mi fajfas! 5. Babilado, babilado. 6. Trinkmono. 7. Kiam la leciono komenciĝis, li pafis sin for. 8. Konkuri por vako. 9. Iom da pluvo ne malutilos. 10. Krevi de envio. 11. Mi trouzas vian bonecon. 12. Trafikŝtopiĝo. 13. Akvoimuna, akvoeltena horloĝo. 14. Fajroeltena. 15. Prudento. 16. Surbrusta identigilo. 17. Osto en la gorĝo. 18. Ĉe l' freŝa faro. 19. Pagi por fremda festeno. 20. Embarasiĝi. 21. Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas. 22. For de l' okuloj, for de la koro. / Antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras. 23. Sako malplena sin rekte ne tenas. 24. Mia patro eksplodis de ridado, mia patrino krevis de kolero kaj afliktiĝo, kaj ĉiuj estis konfuzitaj. 25. Sinjorino Dionora, posedanta belajn harojn kaj okulojn seriozajn, aŭkultis tiun mesaĝon kaj ne tralasis eĉ bloveton de siaj pensoj al la povra servisto Kim.

## EM BUSCA DO MÉTODO IDEAL

1. TRADUZIR OU NÃO – EIS A QUESTÃO – De acordo com o chamado “Método Direto”, o ensino de um segundo idioma deve ser feito “diretamente” nesse mesmo idioma -- sem nenhuma tradução para a língua materna do aluno. Na década de 1930, o famoso Andreo Cseh, na Europa, usou em vários países a sua versão do Método Direto para o Esperanto. Em nossa opinião, somente alunos muito talentosos para o estudo de línguas conseguem aprender por esse sistema não-tradutivo. Eu mesmo, há muitos anos, estudei Inglês, no antigo Instituto Yázigi, sem tradução – pois vários professores eram nativos da Língua Inglesa e, às vezes, nem sabiam o Português direito. O curso foi feito em três semestres intensivos, com duas aulas por semana. Dos 30 alunos que frequentaram o curso completo, só uns 5 fizeram a prova final – e só uns 3 fomos aprovados. Qual teria sido o nosso “segredo” para a aprovação? Acho que foi porque, em casa, costumávamos consultar um dicionário bilíngue... Acontece, porém, que nem todos os alunos de línguas, inclusive do Esperanto, têm a necessária capacidade ou disposição para valer-se de um dicionário – para verificar, principalmente, o sentido de partículas, por assim dizer, “abstratas”, como é o caso de preposições, conjunções e advérbios primitivos... Alguns adeptos do Método Direto alegam que o uso da língua materna atrapalha o domínio da nova língua, impedindo a fluência na conversação... Felizmente, porém, em nossa experiência, o uso da tradução prévia do texto da lição, antes da prática “direta” da conversação, tem demonstrado justamente o contrário, pois os alunos, em geral, depois de um breve “treinamento”, conseguem responder imediatamente às perguntas do exercício oral intitulado “Respondu” (= Responda), que aparece logo depois da historietta das lições iniciais do nosso livro “Esperanto Conversacional” (Curso Básico).

2. O SEGREDO DA CONVERSAÇÃO: RESPONDER / PERGUNTAR / NARRAR -- Como se pode observar, a conversação – em qualquer língua – depende apenas de 3 capacidades principais, que podemos resumir em 3 palavras: Responder, Perguntar e Narrar. Em nosso livro “Esperanto Conversacional” (Curso Básico), o nosso aluno é treinado nesses três aspectos principais da conversação. Assim, em qualquer língua, uma conversação comum não tem mais do que esses três aspectos, ou seja, os interlocutores, em geral, primeiro fazem um verdadeiro diálogo, com várias perguntas e respostas; depois, cada um deles pode fazer um verdadeiro monólogo, no qual narra um fato ou dissertam sobre algum assunto. Trata-se, enfim, de um verdadeiro “ovo de Colombo”, ou seja, toda a conversação humana, em geral, só exige essas três capacidades principais: Responder, Perguntar e Narrar. Quanto a essa tese, o coidealista Carlos Lima Melo, que nos informou sobre ela, não se lembrou, na época, onde a teria lido. Como já sabemos, em nosso método (que denominamos de “Método Misto-Dinâmico”), tentamos treinar justamente esses três aspectos principais da própria conversação, através de 3 “exercícios orais” específicos, intitulados, respectivamente: “Responda”, “Pergunte” e “Narre”. Nas lições iniciais do citado livro, só usamos o primeiro tipo de exercício, que é o mais fácil, ou seja, “Responda”. E, nas lições finais desse mesmo livro, usamos os dois últimos tipos, ou seja, “Pergunte” e “Narre”. Isso significa, na prática, que o nosso “curso básico” (com o citado livro “Esperanto Conversacional”) já constitui, por si mesmo, não só um curso básico propriamente, mas, ao mesmo tempo, um verdadeiro “curso de conversação”. Porém, esperamos que o aluno fique ainda mais fluente em sua conversação se fizer, em seguida, o nosso “Curso de Aperfeiçoamento”, por meio do livro intitulado “La Konversacia Klubo”.

3. O PREPARO DO PROFESSOR – Em nossa opinião, vários bons alunos podem tornar-se bons professores de Esperanto. O mais importante é que tenham o dom natural de conseguir “transmitir” seus conhecimentos a outrem. Acontece que, infelizmente, há alguns indivíduos que, embora sejam muito cultos, só sabem, ironicamente, “explicar para si mesmos”... Em nosso método, porém, a tarefa do professor “leigo” fica bastante facilitada, pois trata-se de livros que foram feitos para o estudo com ou sem o auxílio de professor. Isso significa que, mesmo no começo da sua atividade, o novo professor poderá ter um desempenho razoável, pois, a rigor, os alunos poderiam aprender até mesmo de modo autodidático. Além disso, em nossos livros didáticos, sempre damos as necessárias “Instruções aos Professores”, bem como as devidas “Instruções aos Alunos”. E há também o auxílio dos discos de áudio, ou seja, os CD's, os quais, aliás, podem ser ouvidos ou “baixados”, gratuitamente, através da Internet, bastando acessar o site da nossa Cooperativa. Como se sabe, o nosso método completo é constituído por 3 obras principais: “Minicurso de Esperanto” (Curso Introdutivo), “Esperanto Conversacional” (Curso Básico) e “La Konversacia Klubo” (Curso de Aperfeiçoamento). Se você ainda não conhece algum ou alguns desses livros, peça-os à nossa Cooperativa, através do citado site, ([www.kke.org.br](http://www.kke.org.br)).



Fabiano Henrique prelegas pri  
Ismael Gomes Braga



Alvaro Motta prelegas pri la  
94<sup>a</sup> Universala Kongreso



Jeremias Santos prelegas pri  
Teorio de la Koloroj



Ago-tago oktobro 2009  
en Rio de Janeiro



Graça Thuler kaj Rosana Carames  
prelegas pri la 94<sup>a</sup> UK



Célio Martins prelegas pri la  
pola lingvo



Alfredo Aragón prelegas pri  
Sylla Chaves



Dirce Sales kantas en la  
Festo de la Datrevenantoj



Nilson Costa sin prezentas  
en la Festo de la Datrevenantoj